

# KRESKO <sup>2</sup>

2018 januaro

KROATA ESPERANTISTA KOLEGARO

## KIAN KRESKON NI BEZONAS?

*Kresko* estas lanĉita cele al pli bona reciproka informado. Laŭ multaj el viaj respondoj, tia enhavo ne sufiĉas.

Unuflanke niaj legantoj preferas variajn legaĵojn, kiuj ne havu nur raportan karakteron pri niaj aranĝoj, kaj aliflanke oni postulas aktualecon de la informoj. Evidente ni ne povos kontentigi ĉiujn dezirojn, ĉar multfoje unu ekskludas la alian. Ekzemple, se iu leganto ne volas vidi grupajn fotojn, aliaj ne povas imagi raporton sen ili. Se iu ŝatas legi pri turismaj, politikaj kaj kulturaj temoj de Kroatio, aliaj asertas, ke ni ripetas la erarojn de eksaj socialismaj reĝimoj, kiuj

Esperanton uzis por sia eksterlanda reklamado. Se ni postulas, ke oni ne skribu ofendajn kaj kritikajn tekstojn, aliaj diras ke temas pri cenzurado kaj malobeco de la demokratio. Do estas malfacila tasko trovi ekvilibron inter deziroj kaj bezonoj, inter la rajto kritiki kaj afable skribi. Verŝajne la sola ĝusta solvo estas moderigi la vortaron kaj eviti disflamigon de ekzistantaj problemoj. Oni nepre komentu, sed kun afableco al aliaj, ĉar malafablaj vortoj faras netransponteblan abismon en la estonteco, kion ni en Kroatio, kaj ankaŭ multaj alilandaj esperantistoj, bone scias el la propra praktiko.

Esperantistoj estas malmultaj, kaj se ili agas malamike unu al alia, ili perfidas ne nur la ideon de Zamenhof, sed ankaŭ malgrandigas la ŝancojn por utila uzado de Esperanto. Kiu ajn foriras el niaj vicoj ofendita kaj vorte vundita, tiu estas pli konkreta kontraŭulo de Esperanto kaj esperantistoj, ol tiuj, kiuj pri Esperanto nenion scias.

Esperanto kaj ĝia movado estas malfortaj plantoj, kiuj bezonas prizorgon de kapabla, laborema kaj pacienca ĝardenisto, kiun ili devas trovi en ĉiu esperantisto mem. Nur se ni permesas ke ĉiu el ni fariĝu kapabla kaj pacienca laboranto, ankaŭ la Movado donos dolĉajn fruktojn kaj riĉajn rezultojn. Ne gravas pri kio ni okupiĝos en Esperantujo, ĉar estas multe pli da laboro ol da laborantoj! Ne gravas eĉ ĉu ni membras en iu organizaĵo aŭ ni agas individue. Kelkfoje unu libere aganta individuo povas fari multe pli da utila laboro, ol tuta membraro de iu organizaĵo katenita per diversaj statutaj difinoj. Eĉ organizaĵoj laboru aparte, se ili ne povas kune. Sed ili ne militu!

Konklude, do, ni certe bezonas tian gazeton, kiu ebligu senkverelan kaj liberan laboron al ĉiuj!



## Iom da statistiko

- La unua numero de *Kresko* estis sendita la 24-an de decembro 2017 al 423 retadresoj de diverslandaj esperantistoj, troviĝantaj en la privata adresaro de la redaktoro.

- Dudek adresoj el tiu listo montriĝis nevalidaj.

- Venis du aŭtomataj respondoj, ĉar la adresatoj forestis.

- Ĝis la finredakto de ĉi tiu numero 11 personoj petis forigon el la dissendolisto, klarigante tion per sia troa okupiteco.

- Venis entute 106 konfirmoj, ke la adresatoj volas daŭre ricevi la gazeton. Kelkajn opiniojn de la ricevintoj de la unua numero vi povas legi en la rubriko *Viaj opinioj* (paĝo 20).

- Kvar personoj konfirmis, ke ili proprainiciate plusendos la gazeton al aliaj legantoj.

- La aktuala dissendolisto enhavas 390 adresojn. Novaj adresoj estos aldonataj kaj malnovaj forigataj laŭpete.

## ESPERANTA ĴURNALISMO KAJ GAZETELDONADO EN NOVAJ TEKNOLOGIAJ KONDIĈOJ

*Asertoj el la prelego, prezentita antaŭ unu jardeko al la Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-Ĵurnalistoj en Vilnius (2008) konfirmas sian pravecon.*

Novaj teknikaj kaj teknologiaj kondiĉoj superŝutas la homaron. Neniu homa aktiveco restas netuŝita, kaj ĉiu profesio travivas adapto-periodojn. Tio, kio en nacilingvaj ĵurnalismo kaj gazeteledonado rilate la teknologiajn novaĵojn estas jam tute kutima afero, en kazo de Esperanto apenaŭ uzeblas.

Kvankam la ideo pri perado de informoj ekde ilia fonto al ilia konsumanto estas malnova afero, kiu disvastiĝis aparte post ekesto de skribsistemoj, sian plej grandan evoluon ĝi travivis en la post-Gutenbergera periodo (post la jaro 1440). Ĝis tiu momento produktado de pluraj kopioj estis ebla nur per malfacila manlaboro, per simpla reskribado de tekstoj. La eltrovo de prestekniko estis turnopunkto de la informado, kaj ĝiaj konstantaj plibonigoj venigis nin en la epokon, en kiu la informindustrio jam grave superis la teknologion, kiu ebligis ĝian alproksimiĝon al amasaj konsumantoj.

Prestkenologioj, kiuj komence estis komplikaj kaj malfacilaj laborprocedoj, ĉefe plenumataj per manlaboro, dum kelkaj jarcentoj evoluis al parte aŭ plene aŭtomatigitaj procedoj.




*Mankompostado per plumbaj literoj*

La komencajn plumbajn literojn. mane kompostatajn, anstataŭis la kompostmetodoj de plenaj tekstlinioj el fandita plumbo. Poste venis fotokompostado, elektronika kompostado kaj fine la komputila. La presteknikoj evoluis el la komencaj tipografiaj, kiuj funkciis per premado de pres-formo el plumbaj literoj kaj tipografiaj kliŝoj sur paperon, al nuntempe ĉefe uzata ofseta prestekniko, kiu uzas presplatojn, kiuj kopias sian enhavon sur kaŭĉukan cilindron, kaj tiu sur paperon. Ĉar en la ofseta preso la literoj ne elstaras super la nivelo de la presplato, sed troviĝas mem en la platinivelo, la kopioj

riceveblas per kemia procedo okazanta sur la presplato.

Krom tiuj du ĉefaj presteknikoj ekzistas ankaŭ aliaj: litografio, hektografio, serigrafio, sed ili malofte uzeblas por bona gazetpresado.

En la komenco de la Esperanta gazeteledonado, la gazetoj estis presataj en profesiaj presejoj, ĉar la presteknologio estis tro komplika kaj tro mutlekosta, neplenumebila sen multa manlaboro kaj sen granda sperto. Tial la esperantistoj en la pionira periodo devis uzi la servojn de profesiuloj, kaj la gazetoj ne multe diferencis de la nacilingvaj eldonaĵoj en la



*Johannes Gutenberg (ĉ. 1400 - 1468) kaj repliko de lia presilo*







*Moderna kvarkolora ofseta presmaŝino por plenkolora presado kaj separatitaj koloroj por tia presado.*



teknologia kaj aspekta sencoj. Tio certe kaŭzis gravajn problemojn, ĉar multaj presistoj ne disponis pri Esperantaj litertipoj, kaj la preskvantoj de Esperantaj gazetoj estis malgrandaj, kio pligrandigis poekzempleran koston, kiun abonoj ne povis kovri. En kelkaj fazoj de la Esperanta gazeteldonado aperis profesiaj entreprenoj, kiuj jam komence provis uzi Esperanton por komercaj celoj (ekzemple *La Revuo* presita en Parizo). Tamen, esperantistoj ĝenerale ĉiam provis eviti profesion servon, kiun ili malfacile povis pagi. Ĝuste pro tiu fakto, niaj gazetoj en certaj periodoj estis produktitaj hektografie, litografie, stencile ktp., kio donis neallogan rezulton, sekve neinteresiĝon de la legantoj, kaj plue ankaŭ rapidan malaperon de tiaj gazetoj. Tio klarigas multecon de la gazetoj en Esperantujo, kiuj estis ĉefe produktataj ekster la profesiaj


entreprenoj, multfoje prizorgataj de nur unu persono kaj financataj per ties privata mono, kiu estis malabunda kaj mankis por liaj propraj vivbezonoj. Malgraŭ tiu fakto, ĉiam tra la historio de la Esperanta gazeteldonado svarmis kuraĝuloj, kiuj aventuremis en tiu nekonata maro.

Pro la nestabila situacio de Esperanto-gazetoj, ankaŭ la situacio de Esperantaj ĵurnalistoj estis ĉiam komplika. Maloftis profesiuloj, kiuj okupiĝis ankaŭ pri la Esperanta ĵurnalismo kaj ankaŭ nuntempe la ĉefan ĵurnalisman laboron faras duonprofesiuloj, hobiaj ĵurnalistoj, kaj plejparte la artikolverkantoj estas simplaj homoj, esperantistoj, kiuj kapablas verki kaj havas moralan aŭ alian intereson tion fari por la publiko.

Granda ŝanĝo en la Esperanta ĵurnalismo okazis ĉefe post la dua mondmilito, kiam Esperanto en kelkaj mondregionoj

akiris simpatiojn de la tiamaj reĝimoj, kio ĉefe videblis en la socialismaj landoj de Eŭropo kaj en Ĉinio. En tiu periodo aperadis bone presitaj gazetoj, ekzemple *Nuntempa Bulgario*, *El Popola Ĉinio*, *Hungara Vivo* k.a., kies celo estis diskonigi informojn pri la landoj, kies registaroj financis ilian eldonadon. Kiam la socialisma epoko malaperis el la politika scenejo de tiuj landoj, la saman sorton dividis ankaŭ tiuj gazetoj, kaj esperantistoj sentis premon de la libera merkato. En la libermerkataj kondiĉoj ankaŭ Esperanto devis adaptiĝi kaj fariĝi varo vendata. En la situacio kiam oni nepre devas el privataj monuoj elpreni monon por eldoni gazeton, aŭ iu devas sponsori ĝin, multaj gazetoj malaperis aŭ baraktas en financaj problemoj. Similajn problemojn ne povis eviti eĉ la plej sukcesaj.

Ekde la 1980-aj jaroj estis evidente, ke nova komputila teknologio, kiu ĝis tiam estis nur en eksperimenta fazo rilate la teksto-prilaboron, rapide progresos. Subite la kompostado kaj produktado de presita materialo fariĝis *hejma laboro*. En la 1990-aj jaroj la komputila kompostado estis jam malnova ĉiutagaĵo ankaŭ de Esperantaj redakcioj, kiuj povis mem prepari kompletajn paĝojn, printi ilin per lazeraj printiloj sur travidebla folio, kaj porti al presisto, kiu el ili produktis ofsetajn presplatojn



*El Popola Ĉinio:  
Unu el la plej bele presitaj  
Esperanto-gazetoj*



*Kompostilo por fari kompletajn teksto-liniojn el fandita plumbo kaj elektronika kompostilo de IBM, la lasta ŝtupo antaŭ apero de komputila kompostado.*

kaj presis kion ajn je relative akcepteblaj prezoj. Presplatoj, kiuj en la komenco estis komplikaj por rivelado, kaj en kelkaj siaj versioj postulis ankaŭ uzadon de lako por fiksi la plej supran tavolon, evoluis al bonkvalitaj platoj, kiuj povas fari milionojn da kopioj kaj estas facile produkteblaj, konserveblaj por presado de novaj kvantoj kiam necese. La komputiloj permesas konservadon de la kompostita materialo, kaj per evoluo de grafikaj komputilaj programoj, la kvalito de la kompostaĵoj faritaj eĉ ĉe neprofesiuloj fariĝas respektinda.

La unua jardeko de la 21-a jarcento eĉ plie progresigis la grafikajn teknologiojn. Lazeraj printiloj, kiuj antaŭe estis nur unukoloraj, en amasa uzo aperas ankaŭ por plenkolora presado, kaj iliaj diĝitaj versioj proksimiĝas al la kvalito de la ofseta presado. La lastaj serioj de diĝitaj printiloj fakte estas presmaŝinoj, kiuj ne uzas pulvoron

por presado de kopioj, sed specialajn farbojn. En sia pli frua versio, tiuj farboj estis rekoneblaj nur pro sia rebrilo sur la presita folio, sed la plej novaj printiloj eliminis eĉ tiun diferencon inter la printita kaj ofsete presita kopio. Nuntempe ne plu eblas rimarki la diferencon inter ofsete presita kaj diĝite printita folio sen bona kono de la grafika teknologio. Avantaĝo de diĝitaj printiloj estas, ke ilia prezo malkreskis, ke ili estas destinitaj por multaj kopioj, ke la kosto por unu kopio estas malgranda, ke ili estas ligitaj rekte al komputilo kaj do ili ne bezonas presplatojn nek grafikajn filmojn, nek purigadon post presprocedo. Unuvorte, la presprocedo evitis kelkajn operaciojn kaj tiel ŝparas tempon kaj monon. Krom tio, en la diĝita presprocedo ne ekzistas makulatoj, ĉar ĉiuj kopioj ekde la unua ĝis la lasta estas egalaspektaj. Perkomputile eblas

facile ekvilibrigi la preskolorojn kaj tiel ricevi plej bonan kaj plej efikan rezulton, kio en la ofseta teknologio eblas nur ĉe la presmaŝinoj novgeneraciaj, dum la malnovaj unukoloraj presmaŝinoj tion ne ebligas. Avantaĝo de diĝitaj printiloj estas ankaŭ, ke oni povas presi precize la kvanton bezonatan, per kio malgrandiĝas la kvanto de remitendo, kiu estis grava malŝparo de mono. En kazo de preciza preskvanto, se oni bezonas aldonajn ekzemplerojn, oni simple enŝaltas la komputilon kaj printilon kaj presas novan kvanton. Tiu presoteknologio estas plej proksima al la bezonoj de la Esperantomovado pro kelkaj kaŭzoj. Unu el ili estas, ke la meza kvanto da abonantoj de unuopa Esperantogazeto ne superas kelkajn centojn, kio bone kongruas kun la eblecoj ofertataj de la diĝita presado. Alia kaŭzo estas, ke la preskostoj estas reguligeblaj kaj bone konataj, kaj



*Novgeneracia CTP-maŝino por komputila pretigo de ofsetaj presplatoj kaj moderna diĝita presmaŝino, kiu garantias altkvalitajn plenkolorajn produktojn.*



la tempoŝparo estas evidenta pro tio ĉar la produktado povas okazi ekde verkado de artikoloj, ĝis kompostado, skanado, enpaĝigo kaj presado en unu sama loko, eĉ en unu sama ĉambro, sendepende de profesiaj presistoj kun granda profesia sperto, sendepende de aliaj laboroj en iliaj presejoj, kaj sen transportaj kostoj.

Se tamen oni devas uzi la ofsetan presteknologion, ankaŭ en tiu fako okazis gravaj ŝanĝoj. Unu el la plej gravaj estas la CTP-teknologio (angle: *Computer-to-plate*), kiu subkomprenas aŭtomatigon de la procedo de presplata produktado kaj rivelado. La CTP-maŝino estas ligita al komputilo, kaj sen grafikaj filmoj oni produktas bonkvalitajn presplatojn kaj rivelas ilin aŭtomate. En tiu maŝino estas aŭtomate farata separado de preskoloroj, kaj la precizeco estas perfekta. Tio grave altigis la preskvaliton.

Al la grafika teknologio aldoniĝis tre intense ankaŭ komunikaj teknologioj. La komunikaj teknologioj en la pasinteco estis tre limigitaj. Eltrovo de telefono, poste de telekopiilo, faksilo, lastatempe senrevenue cedas la lokon al interreto kaj poŝtelefono, kiu permesas rapidan voĉan kontakton, sed ankaŭ ĝi fariĝas iom post iom arkaikaĵo, ĉar aperis interreta telefonado, sendrata interretkonekto, saĝaj telefonoj ktp. Ĉiuj tiuj teknikaj ŝanĝoj starigas la demandon: Kie troviĝas la fino de komunikaj eblecoj? La respondo estas netrovebla, ĉar ni vivas en la epoko de komunikado. Postuloj de tiu epoko starigas antaŭ produktantojn ĉiam novajn defiojn.

Ĵurnalistoj en iuj epokoj estis ekipitaj per krajono kaj paperfasko, ili konis stenografion kaj rapidis de loko, el kiu ili raportis, al sia redakcio por ĝustatempe tajpi la tekston per skribmaŝino kaj kuri al la kompostejo. En la Esperanta gazeteledonado tiu ciklo okazis multe pli malrapide. Esperantujo vivis kviete, ĉar ĝi ne havis ĉiutagajn gazetojn. Esperantaj gazetoj estis plejparte monataj, dumonataj aŭ kvaronjaraj. Nur kelkaj, kiel *Heroldo de Esperanto*, sukcesis dum certa tempo aperi sinsekve en malpli longaj periodoj.

Nuntempe la modernaj teknologioj venigas ŝanĝojn ankaŭ en la redaktadon kaj eldondon de la Esperantaj gazetoj. La Esperantaj ĵurnalistoj devas uzi interreton, ĉar sendado de tekstoj per leteroj estas multekosta kaj longdaŭra, sendado per faksilo devigas la redaktejon fari duoblan laboron, ĉar oni devas retajpi aŭ skani la tekston jam tajpitan de la ĵurnalista, dum interreto permesas sendi rapide kaj la tekston kaj la necesajn fotojn, kaj liberigi la redaktejon de kroma laboro. Tio rezultas per tempo- kaj labor-ŝparado, kio ebligas produkti la gazeton relative rapide. Ĉi tie indus mencii ankaŭ radioĵurnalistojn, kiuj en la evoluo de la Esperanta informado havis tre gravan rolon, ĉar multaj radio-stacioj elsendis en Esperanto. Sed interreto ankaŭ al la tradiciaj radioelsendoj iom post iom altrudas ŝanĝojn. Pluraj radio-stacioj jam estas aŭskulteblaj per interreto anstataŭ per radioondoj, el kiuj mi menciu *Polan Radion* kiel la plej freŝan ekzemplon en tia rolo.

Revenante al la temo de gazeteldonado, en Esperantujo aperas akoraŭ kelkaj, ĝis antaŭ nelonge nekonataj fenomenoj. La fenomenon de sensaciismo en la ĵurnalismo, nacilingvaj gazetoj konas jam delonge. En la Esperantaj gazetoj, malgraŭ kelkaj esceptoj en la pasinteco, tiu *flava ĵurnalismo* estas afero relative nova. Tio estas tute komprenebla, ĉar novaj teknologioj permesas

tujan reagon al ĉiu evento, kaj ankaŭ la redaktoroj de Esperantaj gazetoj rimarkis tiun interligitecon de skandalpriskribaj artikoloj kun interesiĝo de la legataro pri iliaj gazetoj. Ĉar cenzurado ne ekzistas, kaj la teknologioj estas facile akireblaj kaj manipuleblaj, ankaŭ la verkado de artikoloj fariĝis malpli (mem)kritika. Ekzistas ankaŭ esceptoj, el kiuj mi mencius *Liberan folion* en ĝia komenca fazo, kiu ne estas presita, sed interreta gazeto, sed en sia komenco ĝi sukcesis plikvalitigi la Esperantan ĵurnalismen, reagante rapide per prezento de novaĵoj kaj reagoj pri unuopaj tekstoj.

Menciinte *Liberan folion* ni venas al nova ĉapitro en informada progreso. Se ni neglektus tiun parton de la legantoj, kiuj ĉiam preferas sur sia polmo *pesi* gazeton dum legado, granda parto da, precipe jungeneraciaj legantoj, esprimiĝis favore al interretaj gazet-eldonoj, kiuj el aspekto de rapida kaj facila informfluo donas maksimumon. Pro tiu fakto la redakcioj de presitaj gazetoj devos vole-nevole adaptiĝi al interreto. Iuj tion jam sukcese faras, permesante legadon aŭ elŭton de kompletaj numeroj. Iuj decidis oferti nur la enhavtitolojn, kaj iuj komplete ĉesis eldoni presitajn numerojn.

Tiu iom-post-ioma elimino de presitaj gazetoj el la Esperanta informkampo, povus havi kelkajn konsekvencojn. Iuj estas pozitivaj, kiel ekzemple plirapidiĝo



La lastaj paperaj numeroj de la kroatiaj Esperanto-gazetoj Tempo kaj Zagreba Esperantisto.

de la informfluo, malplikostiĝo, pligrandiĝo de la nombro da legantoj, sed aliaj povas reflekti negativajn. Per rapida enretigo povas okazi lingvaj kaj stilaj eraroj, kiuj kaŭzus malrespekton al la informlanĉinto, sed pli danĝeras la potenciala ebleco lanĉi falsajn informojn, kiuj farus konfuzon aŭ damaĝon al iu persono aŭ organizaĵo.

Mi venas el la grafika fako, kaj do tute nature mi ĉiam preferas vidi paperan gazeton. Ne nur pro tio ĉar en ĝi mi vidas produkton de mia laboro kiel ion palpeblan, sed ankaŭ pro la fakto, ke mi ne kredas, ke la elektronika teknologio povas plene anstataŭi la presan. Kiam aperis komputiloj kaj interreto, ĉiuj prognozis malaperon de presitaj libroj, sed nuntempe tiu regreso ne tre videblas. Nacilingvaj gazetoj ĉiam plimultiĝas, ankaŭ la Esperantaj ne tuj fiaskis, kaj legantoj de tempo al tempo skribas, ke ili pli agrable legas la paperan eldonon, ĉar ili povas teni ĝin ankaŭ kuŝante, aŭ ke iliaj okuloj ne doloras pro la legado de presitaj gazetoj sed pro longtempa legado surekrane. Kvankam interreto havas eblecojn, kiujn la preso ne havas, ĝi estas ankaŭ la loko, kie la aferoj rapide ŝanĝiĝas. Malnovaj enhavoj malaperas, la novaj alvenas, la ŝanĝoj estas tro rapidaj, kaj la rezulto ne ĉiam prognozebla. El la grafikista vidpunkto, se oni produktas kelkcent ekzemplerojn de iu gazeto, malgraŭ la rompebleco de papero kaj ĝia damaĝado per humideco kaj fajro, supozeble kelkaj ekzempleroj por ĉiam restos konservitaj ie. El la vidpunkto de interreto-uzantoj, por konservi gazetojn paperajn estas bezonata spaco, neniigo de arboj kaj poluado de la naturo, dum

multaj jarkolektoj de elektronikaj gazetoj povas trovi lokon sur unu kompaktdisko senprobleme. El alies vidpunkto, ankaŭ kompaktdiskoj ne estas sekuraj, kaj la lastaj pruvoj montris, ke post kelkaj jaroj ili povas malaperi. Estas do malfacile kredeble, ke kompaktdiskoj povas por ĉiam konservi la enhavon. Pli kredeblas, ke ili estas malpli rezistaj ol papero. Alia grava obstaklo de teknologioj, kiun agnoskis ankaŭ la biblioteka kolokvo okazinta en Vieno, estas konstanta ŝanĝado de teknologioj, pro kio oni devas ripete kopii la jam ekzistantajn diskonojn al pli novaj versioj. Ne faciligas la aferon ankaŭ konstanta ŝanĝado de komputilaj programoj, pro kio estas sub demandsigno, ĉu iu povos tralegi iun kompaktdiskon post multaj jardekoj. Kompare kun tio, la presita gazeto ne bezonas adaptojn, ĝi restas unufoje produktita por ĉiam egala.

Resume mi volas diri nur kelkajn vortojn. La informfluo ankaŭ en Esperantujo plirapidiĝas. Tiuj ŝanĝoj antaŭ la Esperantaj ĵurnalistoj starigas postulon pri adaptiĝo. Ili devas uzi modernajn teknikajn por povi komuniki rapide kaj efike. Tiu rapidiĝo estos eĉ pli granda en tre proksima estonteco. Al eldonistoj la nuntempa epoko starigas la demandon, ĉu rezigni pri presitaj gazetoj, ĉu kombini la presitajn kaj elektronikajn, aŭ elekti nur la elektronikajn. Ĉiu el la eldonistoj devos mem decidi surbaze de propraj rezonoj, sed la decido devos okazi rapide kaj eble kaŭzos dolorajn postsekvajn.

En tiu vetkuro, mi kiel grafikisto povas nur konstati, ke la plej gravaj presteknologioj, la rotaciaj, kiuj produktas gazetojn

en enormaj kvantoj dum mallonga tempo, neniam estos uzablaj por presado de niaj gazetoj, ĉar ni estas *malgranda popolo* dissemita tra la Terglobo, kun nekontentige malgrandaj eldonkvantoj. Ĉu vi povas imagi esperantistojn, kiuj ĉiutage iras al gazetvendejo kaj aĉetas novan numeron de tagĵurnalo en *sia* lingvo? Tiu bildo estas kvazaŭ iaspeca fina venko, alivorte: bela revo neniam realigota. La plej gravaj obstakloj estas la jam menciitaj: malgranda nacio, dissemita tra la mondo, malgrandaj eldonkvantoj, grandaj produkto- kaj ekspedo-kostoj, superrego de la elektronikaj eldonoj kaj interreto. Tamen, ni menciuj ankaŭ, ke la populacio de Esperantujo estas maljuna, malfacile adaptiĝema, tradiciema, grandparte emocie ligita al presaĵoj. Tiu generacio, kiu vivas en reala mondo, malfacile adaptiĝos al la virtuala. Mi do prognozas, ke la teknologiaj ŝanĝoj alportos grandajn problemojn al eldonistoj de paperaj gazetoj, sed tamen ne sukcesos komplete forigi ilin el la informa kampo. Iom pli da ŝanco por travivi havas magazinoj ĉar intereso pri ili estas pli granda kaj ne dependas de rapida eldonciklo, kaj naciaj Esperanto-gazetoj, ĉar ili ankaŭ estonte ne dependos de abonoj, sed de kotizoj kaj sponsoroj. En la globala mondo, la ŝancoj pli grandas ĉe la gazetoj, kiuj jam fariĝis *varmarkoj*, sed la redakcioj kaj eldonistoj devos peni por konservi tiun statuson. Por faciligi la lukton al eldonistoj, necesus organizi ĵurnalistojn, kiuj fariĝu decida forto en la kreado de publika opinio en Esperantujo. Informdistribuantoj devas esti fidindaj fontoj. Kvankam ankaŭ en la ekstera mondo ĵurnalismo ne plu estas tradicia, esperantistoj devos provi konservi lojalecon al la vero. Ĵurnalisto ĉesase esti nur profesia kategorio, sed oni devas zorgi ke ĝi ne fariĝu kategorio sen identeco.

Mi esperas, ke ankaŭ la ĵurnalista kongreso, kiu kunvenigis nin ĉiujn en la ĉefurbo de Litovio, helpas al ni kompreni la aktualan situacion teknologian, kaj ebligas fari konkludojn cele al serena estonteco de nia ĵurnalismo kaj gazeteldonado.

Josip Pleadin, 2008



Monato kaj Literatura foiro ankaŭ plue paperas!



## RETO DE EŬROPAJ CIKONIAJ VILAĜOJ

En la naŭdekaj jaroj de la pasinta jarcento la *Eŭropa Fondumo pri Protektado de la Natura Heredaĵo „Euronatur“* kreis la honortitolon **Eŭropa Cikonia Vilaĝo** por tiuj komunumoj, kiuj grave kontribuis al protektado kaj konservado de lokoj por ovodemetado kaj kovado de la blanka cikonio en sia lando. Nur unu loko en elektita lando povas esti honorigita per tiu titolo, kaj alia en la sama lando ne povas ricevi ĝin.

La unua titolo de Eŭropa Cikonia Vilaĝo estis atribuita al la kroata vilaĝo **Čigoč** en 1994. Vilaĝo **Pentowo**, situanta en nordorienta Pollando apud la urbo Białystok, kiun mi vizitis dum pola Esperanto-kongreso, okazinta en 2017, ricevis tiun titolon kiel la sepa – en la jaro 2001. Hodiaŭ jam estas 15 Cikoniaj Vilaĝoj en la tuta Eŭropo. Lastatempe tiun titolon ricevis la vilaĝo **Taraš** en Serbio en 2014 kaj **Poros** en Grekio en 2016. Jen mallonga priskribo de ĉiuj lokoj, honorigitaj per tiu titolo.

**Čigoč (Kroatio)** estas la unua Eŭropa Cikonia Vilaĝo en la mondo, honorigita per tiu titolo en 1994. Ĉiujare nestumas tie proksimume 50 cikoniaj paroj. Iliaj nestoj staras sur la tegmentoj de lignaj domoj.

**Nagybajom (Hungario)** estas honorigita per tiu titolo en 1996 pro ĉirkaŭ 30 cignaj paroj, nestantaj ĉiujare sur elektraj fostoĵoj en la vilaĝo.

**Rühstätt (Germanio)** ricevis la titolon de Eŭropa Cikonia Vilaĝo en 1996. Sur la tegmentoj de brikaĵaj domoj en la urbo, pli ol 40 cikoniaj paroj nestumas ĉiujare.

**Malpartida de Cáceres (Hispanio)** estas Eŭropa Cikonia Vilaĝo ekde 1997. Ĉiujare ĉirkaŭ 90 paroj de blankaj cikonioj kreas siajn familiojn en la nestoj, konstruitaj sur grandegaj granitaj rokoj, domaj kaj preĝejaĵaj tegmentoj.

Al **Andrid** en **Rumanio** la titolo de Eŭropa Cikonia Vilaĝo estis atribuita en 1998. Ĉiujare sur la elektraj fostoĵoj en la vilaĝo estas pli ol 30 cikoniaj nestoj.



**Mala kaj Velika Polana** en **Slovenio** estas Eŭropa Cikonia Vilaĝo ekde 1999. La regiono de Mala kaj Velika Polana estas la regiono en Slovenio plej dense loĝata de blankaj cikonioj. Tie nestumas ĉirkaŭ 35 cikoniaj paroj.

**Pentowo** proksime al Tykocin en **Pollando** akiris tiun titolon en 2001. Ĉiun jaron ene de nur unu farmbieno, sur arboj, tegmentoj kaj fostoĵoj, nestumas ĉirkaŭ 30 cikoniaj paroj.

**Marchegg** en **Aŭstrio** ekde 2002 estas rekonata kiel Eŭropa Cikonia Vilaĝo, en kiu ĉirkaŭ 50 paroj de blankaj cikonioj nestumas ĉiujare en arbokronoj.

**Belozem** en **Bulgario** estas Eŭropa Cikonia Vilaĝo ekde 2005. Ĉiujare proksimume 30 cikoniaj paroj venas en la tieajn nestojn, situantajn sur domoj kaj elektraj fostoĵoj.

**Altreu** en **Svislando** akiris la titolon de Eŭropa Cikonia Vilaĝo en 2008. Iliaj nestoj sur domoj kaj arboj ĉiujare estas loĝataj de proksimume 30 cikoniaj paroj.

**Eskikaraağaç** en **Turkio** ricevis la statuso de Eŭropa Cikonia Vilaĝo en 2011, kaj iliaj nestoj staras sur domoj kaj moskeoj.

**Češinovo-Obleševo** en **Makedonio** aliĝis al la familio de Eŭropaj Cikoniaj Vilaĝoj ekde 2012. La cikoniaj nestoj troviĝas sur elektraj fostoĵoj kaj domoj. Ĉiujare ili estas loĝataj de proksimume 70 birdo-paroj.

**Buziko** en **Slovakio** funkcias kiel Eŭropa Cikonia Vilaĝo ekde 2014. En 2013 tie ekzistis 11 cikoniaj paroj, loĝantaj en nestoj lokitaj ĉefe sur elektraj fostoĵoj.

**Taraš** en **Serbio** akiris la statuson de Eŭropa Cikonia Vilaĝo en 2015. En 2014 tie loĝis 40 paroj de blankaj cikonioj.

**Poros** en **Grekio** estas vilaĝo en la komunumo de Feres ĉe la rando de la Evros-delta apud la landlimo kun Turkio. Ĉirkaŭ 200 kvadrataj kilometroj de la delto estas protektataj kiel nacia parko. Multnombraj humidejoj kaj herbejoj laŭlonge de la delto estis transformitaj al arbustejoj dum la pasintaj jaroj, kiam kamparanoj forlasis la lokon. Oni registris 11 cikoniajn parojn, kiuj nestumas tie. Ĝis nun la cikonioj nestis nur sur elektraj fostoĵoj, sed nun la komunumo intencas instali alternativajn artefaritajn nesto-platformojn kun la subteno de la elektra kompanio.

Adam Wilkus



## Surpriza koncerto

La artikolo represita el la revuo *Juna Amiko* n-ro 4/2017 (153), novembro 2017, kun la afabla permeso de la redakcio kaj la aŭtorino.

medion estis por mi tre interesa. Allogis min la ebleco lerni, ekzerci la lingvon, kaj motivigis min kiam mi komprenis iom, kaj kiam mi sukcesis ekparoli. Pro tiuj specialaĵoj la Esperantofestivalo fariĝis por mi neforgesebla. Kaj ne nur por ili...

Surpriza kaj tre bela travivaĵo estis por mi la konatiĝo kaj kunmuzikado kun la fama operkantisto, esperantisto Neven Mrzlečki el Zagreb (Kroatio), unika muzika animo. Li per gitaro akompanas dum li kantas en diversaj lingvoj. Dum INTER-fest li havis tri koncertojn, unu el ili estis nure Esperanta. Mi rakontos pri tiu ĉi koncerto, ĉar ĝi fariĝis speciala por mi.

La trian tagon, dum la paŭzo post la deklamkonkurso

en la Altlernejo, mi konatiĝis kun Neven Mrzlečki kaj ni interparolis. Li rakontis pri la muziknumeroj el sia repertuaro. Subite li pridemandis, ĉu mi ŝatus kunmuziki kun li, ludante la ĉefan melodion en unu kanto... kaj ĉu ankaŭ en la alia... Nur unu horon post la ekesto de la ideo pri la unua kanto jam komenciĝis la menciita koncerto. Surprizo por mi kaj ankaŭ por la publiko. Belegaj, korvarmigaj kantoj, ĉiuj Esperante. Neven kantis kaj ludis gitaron, kaj mi akompanis partojn de kelkaj kantoj. La ebleco kunmuziki kun li estis granda honoro por mi. Lia fido al mi kaj lia malfermiteco impresis min. Mi riĉiĝis je interesa travivaĵo, valora sperto, kaj je nova amiko.

*Blanka Laslo*

Mi estas komencanto de Esperanto el Subotica (Serbio), studentino de la Muzika Fakultato, la fako Instruisto de violonĉelo. Mi studas en Debrecen (Hungario), malproksime de mia familio. Komence de aŭgusto mi akompanis mian patrinon al la Esperanta evento INTER-fest en Bjelovar (Kroatio).

Tiu kelktaga ekskurso estis bona okazo esti kune kun mia patrino, kaj krom tio, ankaŭ por muzikludi. Mi kunportis mian instrumenton, ĉar mi ricevis de la organizantoj inviton por partopreni en la festivala programo per muzikaj eroj. Mi ludis suitojn de Johan Sebastian Bach antaŭ la prezento de la vivo kaj laboro de la fama esperantisto Ivo Lapenna, kies ŝatata instrumento estis ĝuste la violonĉelo. Dua mia muzika intermezo – denove suitoj de Bach – okazis dum la deklamkonkurso, la trian tagon de la festivalo.

La internacia lingvo ŝajnas al mi simpla, kaj eniro en tiun



## Esperanta libro por la prezidentino

Dum decembro 2017 la oficejo de la prezidentino de Kroatio, s-ino **Kolinda Grabar-Kitarović** funkciis en Bjelovar. Dum la tiea restado la prezidentino vizitis ankaŭ la Kvaran elementan lernejon en Bjelovar kaj partoprenis en la projekto *Kroatio legas*. Por la lernantoj ŝi legis ĉapitron el la romano de Mato

Lovrak *Vlak u snijegu* (La trajno en la neĝo). Fine de la programo ŝi ricevis donace ekzempleron de la Esperanta eldono de tiu libro, eldonita de Bjelovara Esperantista Societo kaj Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj, cetere proklamita *Infanlibro de la jaro* en la Belartaj Konkursoj de UEA dum la 101-a Universala Kongreo de Esperanto

en Nitra (Slovakio). Post la eldono de tiu libro en 2015, la prezidentino skribis al la eldonintoj, ke tiu porinfana romano estas unu el ŝiaj plej ŝatataj legaĵoj el la infanaĝo.

Mencienda interesaĵo, pri kiu ni ekscias el alia fonto estas, ke s-ino **Kolinda Grabar-Kitarović** kiel junulino lernis Esperanton.



## Komenciĝis kompilado de kroata Esperanto-enciklopedio

En 1952 Ivo Lapenna fondis **Centron de Esploro kaj Dokumentado** (CED) kiel institucion de UEA, kiu sisteme okupiĝas pri dokumentoj kaj faktoj rilate al Esperanto. Lapenna argumentis, ke sen bona kono de la historio, posedo de respektivaj dokumentoj kaj faktoj, ne eblas utile argumenti favore al Esperanto.

Inspirita de CED, en 2010 en Đurđevac estis fondita **Dokumentala Esperanto-Centro** (DEC) kun la celo sisteme kolektadi materialojn pri Esperanto, ĉefe por preventi perdojn de tia materialo post forpaso de maljunaj esperantistoj kaj malfondiĝo de societoj.

Sep jarojn poste, DEC jam funkcias kiel nacia Esperanto-arkivo. Dum tiuj jaroj multaj materialoj trovis sian sekuran lokon sur la bretoj de DEC, kio ebligis sisteme pristudi ankaŭ la historion de la enlanda movado.

La lasta pristudo de la movado estis farita en 2002, kiam aperis *Biografia leksikono de kroataj esperantistoj*. Nun venis la momento por pli detala kaj pli profunda analizo, kaj DEC aŭtune de 2017 komencis preparojn por ampleksa projekto de *Enciklopedio de Esperanto en Kroatio*. Estas farita listo de ĉirkaŭ 2000 artikoloj

pri diversaj temoj, sed tiu nombro certe ne estas definitiva. Inter septembro kaj decembro 2017 estis verkitaj pluraj dekoj el la planitaj artikoloj, kaj la ĉefa laboro devus okazi dum la jaroj 2018-2019.

La nova projekto multe pli serioze pritraktos la temon de la enlanda movado, ol faris ĉiuj ĝisnunaj aŭtoroj, kritike analizante diversajn temojn, komparante la faktojn kaj reesplorante la uzitajn fontojn. Pro tio ne eblas antaŭvidi la finan amplekson de la *Enciklopedio*, sed nepre temos pri la plej ampleksa tia verko ĝis nun, ne nur en Kroatio.

DEC petas ĉiujn kroatajn esperantistojn helpi en la realigo de ĉi tiu projekto. Komence oni koncentriĝu al **verkado de propraj biografioj**, unuopaj artikoloj pri diversaj temoj kaj notado de atestoj pri ili. Helpi oni povas sendante fotojn kaj dokumentojn el siaj privataj kolektoj, aŭ kontrolante la jam pretajn artikolojn.

Kroataj esperantistoj, kies biografioj troviĝas en la *Biografia leksikono de kroataj esperantistoj* el 2002 bonvou laŭeble tuj kompletigi, aktualigi kaj pliampleksigi tiujn tekstojn, sendi aktualajn fotojn kaj kompili liston de propraj bibliografioj (libroj, atrikoloj, prelegoj, ktp.),

kiuj estos konsistigaj partoj de iliaj biografioj.

Bonvolu kontroli ĉu DEC jam posedas vian dosieron kaj kio troviĝas en ĝi. Se tia dosiero ekzistas, bonvolu kompletigi ĝian enhavon, por ke ni konservu dokumentojn kaj faktojn pri vi kaj via poresperanta laboro por estontaj generacioj kaj esplorantoj. Se ĝi ne ekzistas, estas la ĝusta momento por pretigi ĝin!

Krome, DEC plue akceptas materialojn pri Esperanto. Se vi havas librojn, gazetojn, dokumentojn, fotojn ktp., bonvolu donaci aŭ prunti tian materialon al DEC, kiu ĉi-jare ricevas novan dimension, konstruante propran sidejon por la tuta kreskanta kolekto.

Kaj fine, helpu al ni kolekti la necesan sumon de 11.000 eŭroj por la ĉi-jaraj konstrulaboroj! Tion vi povas fari aĉetante la BRIKO-kuponojn, kiujn lanĉis Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj. Konsciu, ke tiuj kuponoj validos ankaŭ por aĉeto de la eldonaĵoj de DEC, inkluzive la iam aperontan *Enciklopedion*. Aĉetu ilin laŭ via financa povo, ĉar *eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboros la monton granitan* kaj multaj malgrandaj sumetoj helpos al ni kolekti la bezonatan sumegon kaj realigi la planojn!

Kontakto: [dec.kroatio@gmail.com](mailto:dec.kroatio@gmail.com)

## Por deca hejmo de DEC!

AĈETU VIAN BRIKON  
KAJ KONSTRUU KUN NI!

Bankkonto de UZE:  
Udruga zagrebačkih esperantista  
HR7923400091110321529, BIC/SWIFT-kodo: PBZGHR2X



aŭ: *uzes-y* ĉe Universala Esperanto-Asocio

## LA 84-a INTERNACIA KONGRESO DE BLINDAJ ESPERANTISTOJ OKAZOS EN KROATIO

Kroata Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj (KUNE) invitis la 84-an Internacian Kongreson de Blindaj Esperantistoj (IKBE) gasti en Kroatio, la unuan fojon post unu jardeko. La 74-a IKBE okazis en 2008 en Premantura, kaj la Estraro de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE), akceptis la nunan proponon de Kroatio.

La 84-a IKBE okazos de la 7-a ĝis la 14-a de julio 2018 en la hotelo *Tomislavov dom*, kiu situas sur la monto Medvednica apud Zagrebo. Zagrebo kiel kroata metropolo estas facile atingebla aviadile, trajne, buse kaj aŭtomobile, kaj el la urbocentro al la hotelo trafikas regula urba buso.

La kongresanoj loĝos en la tristela hotelo *Tomislavov dom*, kie por ili disponeblas 30 dultitaj kaj 11 unulitaj ĉambroj. La kongresa kotizo kostas 230 eŭrojn por loĝado en dultita, kaj 270 eŭrojn en unulitaj ĉambroj. Al la kongresanoj je dispono estos ankaŭ la hotela naĝbaseno.

Laŭ la unua bulteno, la kongresa temo estos *Kion, kiel kaj kiom ni legas*. Bonvenas prelegoj kaj aliaj kontribuajtoj por la kongresa programo.

Por aliaj detaloj bonvolu kontaktiĝi kun la lokaj organizantoj:



### Antun Kovač:

telefono: +385 1 38-22-682

poŝtelefono: +385 98 99 35 712

retadreso: [antun2805@gmail.com](mailto:antun2805@gmail.com)

### Dragan Štoković:

telefono: +385 52 503-627

poŝtelefono: +385 98 645-976

retadreso: [stokovic@globalnet.hr](mailto:stokovic@globalnet.hr)

## MARIBORAJ ESPERANTISTOJ REELDONIS ROMANON DE STEVAN ŽIVANOVIĆ

Okaze de la pasinta Zamenhofa tago, Maribora Esperanto-Societo eldonis la solan originalan Esperanto-romanon, kies enhavo temas pri Slovenio. Ĝi estas la romano *La sonorilo de Bled* de Stevan Živanović (1900-1938), kiu unuafoje aperis en Beogrado dudek jarojn post lia morto, en 1959. La maribora eldono ne estas nur represo, sed dulingva libro, kiu krom la Esperanta originalo enhavas ankaŭ la slovenlingvan tradukon de Milan Jarnovič, titolitan *Blejski zvon*.

Stevan Živanović estis tre aktiva esperantisto en la periodo inter la du mondmilitoj, kiu naskiĝis en Nova Gradiška (Kroatio), lernis Esperanton kiel 19-jarulo en Zagrebo, sed ekde 1929 vivis en Serbio kaj mortis en Beogrado. Li multege aktivis en la organiza kampo, speciale dum la krizaj jaroj 1931-32, kiam la jugoslavia movado baraktis kun la t.n. *Organiza problemo* (ekzisto de du jugoslaviaj asocioj), li refondis la beogradan societon,

kunredaktis *Bultenon* (1930-31), eldonis *Serban ŝlosilon* (Beograd 1933 kaj Slavonski Brod 1936), *Esperanto-serbokroatan vortaron* (la 1-a eldono en 1934, la 2-a prilaborita kaj kompletigita de Marinko Gjivoje en 1959). Tamen, plej gravas lia literatura verkado. Li mortis nur 38-jara, kaj kvankam li kunlaboris en diversaj gazetoj, kie li lasis multajn poemojn kaj artikolojn, lia verkaro restis nesufiĉe konata kaj neniam komplete eldonita. Liaj unuaj publikigitaj literaturaj verkoj senescepte aperis en Kroatio: *La mizeruloj* (Bjelovar, 1922), *Bela kaj Stela* (Zagrebo, 1925) kaj *La diino de la maro* (Zagrebo, 1926), sed lia plej grava verko estas la ĵus reeldonita romano *La sonorilo de Bled*.

Legante ĝin oni tamen konsciu, ke tiu romano estis verkita antaŭ la Dua mondmilito kaj ke ĝi portas la neforviŝeblan stampon de tiutempa literaturo, aparte la Esperanta. Estus interese ekscii, kie troviĝas aliaj

nepublikigitaj verkoj de Živanović, por rememorigi pri tiu nesufiĉe konata aŭtoro.

La eldono de la mariboranoj estas tre salutinda, kaj la libron oni povas mendi ĉe [info@esperanto-maribor.si](mailto:info@esperanto-maribor.si) je la prezo de 12,00 eŭroj + sendokostoj.





## ZDRAVKO SELEŠ PREMIITA EN LA INTERNACIA POEZIA KONKURSO ĈE LA RIVERO VISTULO

La jaro 2017 en Pollando estis festata kiel *Jaro de Vistulo*. Tiukaze Pola Esperanto-Asocio, Etnografia Muzeo de Toruń kaj Junulara Kulturdomo en Toruń organizis internacian literaturan konkurson *Ĉe la rivero Vistulo*.

La ricevintajn konkursaĵojn prijuĝis la konkursa ĵurio, konsistante el **Lidia Liĝeża** el Kraków, **Maria Pokrzywnicka** el Toruń kaj **Małgorzata Zięba-Szmaglińska** el Gdańsk, kiu aljuĝis plurajn premiojn.

Specialan Premion de Junulara Kulturdomo en Toruń ricevis **Peter den Breems** el Nederlando, pro la versaĵo *Letero al Vistulo*.

Specialan Premion de Etnografia Muzeo en Toruń ricevis **Zdravko Seleš** el Kroatio, pro la versaĵo *La torunaj spickukoj de Kopernik*.

Specialan Premion de Pola Esperanto-Asocio ricevis **Urszula Tupajka** el Pollando, pro la versaĵo *Vistulo mia*.

Per la titolo *Distingo* estas honorigitaj: **Shinjiro Yamato** el Japanio, pro la versaĵo *Snieżka*, **Ewa Grochowska** el Francio, pro la versaĵo *Neforgesebla rivero* kaj **Helena Skonieczka** el Pollando, pro la versaĵo *Mi scias filineto*.

Per la titolo *Laŭdo* estas distingitaj: **Józef Gašiorowski** el Pollando, pro la versaĵo *Alvenu Nikolao*, **Jaen-Pierre Marcq** el Francio, pro la versaĵo *Kara Vistulo* kaj **Elisabeth Garden** el Francio, pro la versaĵo *Riverego*.

Dankleterojn ricevis: **Evelyne Rotellini** el Francio, pro la versaĵo *Wisła Wistulo* kaj **Saed Abbasi** el Irano, pro la versaĵo *Vintra Vistulo en Toruń*.

Specialan Dankon de Studio „P” el Junulara Kulturdomo en Toruń ricevis **Urszula Tupajka** el Pollando, pro la versaĵo *Rivero fluanta*.

*Laŭ la konkursa protokolo verkita de  
Teresa Nemere*

### LA TORUNAJ SPICKUKOJ DE KOPERNIKO


Jen Nikolao manĝas spickukojn,  
vinumas kaj, laca de hezitado,  
subite *proustece* vidas sian pasintecon:  
Vistulon malrapide fluantan,  
apud ruĝetaj torunaj domoj,  
kaj sin ĉe borde, rigardante ŝalupojn.  
Kaj vidas sin, venante hejmen,  
kie odoras torunaj spickukoj  
kaj regas kvieto.  
Ŝajnas, ke nenio ŝanĝiĝis,  
kvankam ŝanĝiĝis la tuta mondo,  
eĉ la tuta universo:  
la Tero el la centro elfalis  
kaj turniĝas ĉirkaŭ la Suno -  
*turniĝas ĉielaj sferoj*.  
Nur Vistulo same fluas norden  
kaj la torunaj spickukoj ja samas.

*Zdravko Seleš*

## Esperanto – izravna metoda

## 75,00 kunaĵoj triona rabato ekde tri ekzempleroj

*Lernolibro por viaj kursoj kaj memlernado, kiu aperis en 40 lingvoj!  
Kroata eldono aĉetebla ĉe UZE: zagreba.esperantisto@gmail.com*



## Mia unua alfabetlibro januare en Daruvar

S-ino **Tanja Golubić Novotni**, anstataŭantino de la bjelovara-bilogora departementestro **Damir Bajš** en oktobro pasintjare kontaktis Bjelovaran Esperantistan Societon kun la demando, ĉu la ekspozicio *Mia unua alfabetlibro* povus gastari en januaro 2018 en Daruvar, kio estis tre volonte akceptita.

Post la tre sukcesa publika prezento de la ekspozicio en aŭgusto 2017 en la Urba muzeo de Bjelovar kaj en decembro 2017 en la Kroata lerneja muzeo en Zagrebo, la gastado en Daruvar estos ĝia tria prezento.

La ekspozicion, kies posedanto estas Dokumenta Esperanto-Centro en Đurđevac, en Daruvar kune organizos Bjelovara Esperantista Societo kaj Popola biblioteko kaj legejo de Daruvar.

Daruvar estas urbo, kie vivas granda kaj tra aktiva ĉeĥa minoritato, kaj s-ino **Golubić Novotni** estas ĝia reprezentanto en la departementaj strukturoj.

Jam kelkajn jarojn inter la 20-a de januaro kaj 20-a de februaro ĉeĥoj en Daruvar organizas aranĝon *Monato de la*

*ĉeĥa gepatra lingvo*, anticipante la internacian *Tagon de la gepatra lingvo* (la 21-an de februaro), proklamitan de UNESKO en 1999. Parto de la ĉi-jara aranĝo en Daruvar estos ankaŭ la ekspozicio *Mia unua alfabetlibro*, al kies malfermo, okazonta la 21-an de januaro je la 12h00, la organizantoj tre afable invitas vin.




**Tanja Golubić Novotni**



**Popola biblioteko kaj legejo en Daruvar**

## Nova komikso en Esperanto aperis en Pollando



Antaŭ nelonge nia komiksa literaturo riĉiĝis je unu nova, profesie eldonita titolo. Komence de decembro 2017 en Esperanto aperis plenkolora komikso *Trezoroj de Mirmilo* el la serio *Kajko kaj Kokoŝo*. Temas pri unu el la plej popularaj polaj komiksaj serioj de **Janusz Christa**.

La serio en amuzega maniero rakontas pri la aventuroj de du slavaj militistoj – la saĝa kaj honesta Kajko kaj la forta, sed memama Kokoŝo – kiuj servas al la kastelestro Mirmilo. La du amikoj kuraĝe protektas Mirmilurbon kontraŭ atakoj de malicaĵ ŝtelantoj,

jen kaj jen alfrontante problemojn.

La noveldonita komikso laŭ multaj elementoj similas la aventurojn de la du gaŭlaj militistoj Asterikso kaj Obelikso de francaj aŭtoroj René Goscinny kaj Albert Uderzo, kiujn ni jam konas en Esperantujo. La bonegan tradukon prizorgis **Przemysław Wierzbowski** el Bjalistoko, kaj publikigis la komikson tre konata eldonejo **Egmont Pollando**.

Kelkaj ekzempleroj por kroataj legantoj haveblas ĉe la redakcio kontraŭ **60,00 kunaĵoj**. Bonvolu mendi ĉe: **zagreba.esperantisto@gmail.com**

**Kelkaj ekzempleroj aĉeteblaj ĉe la redakcio!**



# La kapreolido Pirgo tradukita en la persan

Antaŭ longa tempo instruistino **Josipa Katunar** el Rijeka tradukis en Esperanton unu el la plej famaj porinfanaj libroj verkitaj en la kroata – romaneton *La kapreolido Pirgo* (originale: *Pirgo*), de **Andelka Martić** (1924). En 2011 **Vjekoslav Morankić** sendis la tradukon al **Josip Pleadin**, kiu reviziis la tekston, kaj samjare la eldonejo **Grafokom** en Đurđevac publikigis ĝin. La verko aperis antaŭ la 9-a kongreso de kroataj esperantistoj (okazinta en Bjelovar), kie ĝi estis oficiale prezentita, kun partopreno de la verkistino mem.

Plua aventurado de *La kapreolido Pirgo* tra la mondo estis neatendita. Ĝi atingis esperantistojn en diversaj landoj, interalie en Ĉinio kaj Irano, kiuj ekŝatis kaj tradukis ĝin al siaj respektivaj lingvoj.

Jam en 2011 la romaneton en la ĉinan tradukis **Shi Chengtai**, sed ĝis nun ĝi ne aperis libroforme. Troveblas tamen ĝia elektronika versio ĉe:

小孢子皮尔格 - 世界语学习


En 2016 venis nova ĝojiga informo: *La kapreolido Pirgo* estas tradukita en la persan. Tiun




**Achtar Etemadi**

bonegan peradon de perlo de la kroata porinfana literaturo al iranaj legantoj plenumis s-ino **Achtar Etemadi** el Teherano.

La libro en la persa aperos ĉe la bonfama porinfana eldonejo **Houpaa** en Teherano en kvanto de 2000 ekzempleroj. La aŭtorino jam en 2016 tre volonte liberigis la eldonistojn pagi la aŭtorajn rajtojn, kaj kvankam tre malsana kaj 94-jara (!), ŝi senpacience atendas aperon de sia verko en Irano.



**La Esperanta eldono de La kapreolido Pirgo kaj la unua paĝo de la persa traduko**



**La aŭtorino Andelka Martić (la unua de dekstre) en 2011 inter la kongresanoj dum la libropreznto en Bjelovar**



**La Rid-ordeno de polaj infanoj, atribuita al La kapreolido Pirgo en 1973**

## Ĵurnalista konferenco por esperantistoj en Bjelovar

La 12-an de januaro anstataŭantino de la bjelovara-bilogora departementestro **Damir Baj**s, s-ino **Bojana Hribljan** akceptis delegacion de Bjelovara Esperantista Societo, por kiu estis preparita speciala ĵurnalista konferenco. La delegacion, kiu konsistis el **Zdenka Polašek**, **Željko Saks** kaj **Nenad Margetić**, gvidis la societa prezidanto **Franjo Forjan**, kiu informis la ĉeestantajn ĵurnalistojn pri la pasintjara laboro de la Societo, elstariginte la festivalon INTER-FEST kiel ĝian plej gravan kaj plej sukcesan parton. Al s-ino **Hribljan**, la prezidanto **Forjan** transdonis specialan albumon kun diversaj prifestivalaj eldonaĵoj, dokumentoj, fotoj, filmoj, raportoj kaj gazeteltondaĵoj kaj dankis al la Departemento Bjelovar-Bilogora kaj ĝia estro, s-ro **Bajs**, pro la konstanta financa kaj morala subteno al la projektoj de la Societo.

**Zdenka Polašek** informis la ĵurnalistojn pri la ekspozicio *Mia unua alfabetlibro*, kiu post sukcesa pasintaŭgusta gastado en Bjelovar, invite de alia anstataŭantino de la departementestro, s-ino **Tanja Golubić Novotni**, gastos en Daruvar. Kiel anoncote, la ekspozicio estos kunorganizita de Bjelovara Esperantista Societo kaj Popola biblioteko kaj legejo de Daruvar, en kies ejoj ĝi estos malfermita la 22-an de januaro.

La ekspozicio estos konsistiga parto de pli ampleksa programo, organizata okaze de *Monato de la gepatra lingvo*, kiun ĉeĥoj en Daruvar festos per aro da kulturaj kaj lingvaj programoj.

**Željko Saks** raportis pri la kandidatigo de Bjelovara Esperantista Societo por organizanto de la 20-a *Alp-adria Esperanto-konferenco*. Dum sia restado en la pasintjara konferenco en Brežice (Slovenio), **Josip**



**Pleadin** nome de bjelovaranoj proponis, ke la konferenco en 2018 gastu en Bjelovar. S-ro **Saks** diris, ke en la jaro 2018 oni festos la 40-jariĝon de Alp-Adria Laborkomunumo, kaj ke el 19 esperantistaj konferencoj en Kroatio ĝis nun okazis kvar, sed neniu en la kontinenta parto de la lando. Se la bjelovara kandidatigo estos akceptita, esperantistoj kalkulas ankaŭ pri organiza kaj financa helpo de la Departemento Bjelovar-Bilogora.

Al niaj legantoj ni malkaŝu ankoraŭ unu sekreton: s-ino **Hribljan** en elementa lernejo lernis Esperanton!





## INVITO AL LA 2-a SPECIALA EKSKURSO EN NEPALO

Ĉiun duan jaron Nepala Esperanto-Asocio organizas Himalajan Renkontiĝon, en kiu partoprenantoj piedvojaĝas al la montaro. Tamen inter interesitoj pri Nepalo, iuj ne povas/volas piediri en montaro. Por tiuj homoj NEspA organizas Specialan Ekskurson sen piedmarŝado. En februaro-marto 2018 la Asocio invitas vin al tiu ekskurso.

Mi (HORI Jasuo, japano) jam vizitis Nepalon pli ol 10 fojojn, kaj ĉiun fojon mi trovas novan, interesan aferon. Piedmarŝado en montaro estas ja inda, sed ankaŭ inda estas urba kaj vilaĝa vivo. Vizito al Nepalo estos neforgesebla memoro por vi.

Jen estas detala itinero:

02/26 2018: Alveno al Katmanduo, Nepalo kaj enhoteliĝo.

02/27: Vizito al la temploj Baŭdnath (budha) kaj Pasupathinath (hindua)

02/28: Vizito al la malnova urbo Patano.

03/01: Vojaĝo al Ĉitlang.

03/02: Vojaĝo al Daman, fama turisma loko, de kie oni povas vidi panorame Himalajon.

03/03-04: Vojaĝo al Ĉitaŭn Nacia Parko, kie oni povas ĝui ĝangalan vivon, elefanto-rajdon, birdobservadon ktp.

03/05: Vojaĝo al Lumbini, naskiĝloko de Budho.

03/06: Vojaĝo al Ŝiburari, kie oni loĝas en la vilaĝa domo kaj ĝuas vilaĝan, etnan kulturon.

03/07: Vojaĝo al Pokhara, bela turisma loko kun lago. Oni povas vidi belan neĝan monton de la boato sur la lago. Reveno al Katmanduo per buso.

03/08: Libera tago (turismo en Katmanduo, butikumado) kaj adiaŭa vespero.

03/09: Ekiro hejmen.

**Kotizo:** 900 eŭroj por la 11-taga ekskurso, restado en bonkvalita hotelo, 3 manĝoj ĉiutage, enirpagoj por diversaj lokoj kaj transportado.

HORI Jasuo (s-ro), 371-0825 Japanio, Gunma, Maebasi, Ootone 2-13-3

<hori-zonto@water.sannet.ne.jp>



Himalaja Renkontiĝo en marto 2017.

## PROGRAMO DE LA FRANCA ESPERANTO-KASTELO GRÉSILLON

2018-aprilo-20/28: PRINTEMPaS, intensivaj kursoj

2018-aprilo-27/28: Internaciaj KER-ekzamenoj

2018-majo-09/13: Korusa renkonto de Interkant'

2018-majo-09/13: ReVe, Renkontiĝo Vegana

2018-julio-09/27: Maratona Esperanto-kurso dum ĝis 18 tagoj

2018-julio-16/21: Speciala semajno kun Turismaj vizitoj pri Arto

2018-julio-21/27: Internacia E-Konferenco de OSIEK „Esperanto en Artoj”

2018-aŭgusto-11/19: Festa Semajno por infanoj kaj familioj

La suban bondezirkarton vi povas mendi por 1€ por subteni niajn laborojn por rulseĝuloj.

Bonvolu skribi al [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org)



## INTERNACIA ESPERANTA LITERATURA KONKURSO “HRISTO GOROV – HRIMA”

Hristo Gorov – Hrima estis unu el la plej elstaraj bulgaraj esperantistoj, talenta Esperanta verkisto, poeto, tradukisto kaj publicisto. Bulgara Esperanto-Asocio anoncas Internacian Esperantan Literaturan Konkurson. En la konkurso povos partopreni geesperantistoj el ĉiuj landoj.

La konkurso estos por **rakonto kaj eseo**.

Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per unu rakonto aŭ per unu eseo, originale verkita en Esperanto.

La rakontoj kaj la eseoj estu ĝis 4-paĝaj, komputile kompostitaj.


La konkurso ne havas apartan temon.

**La gajnintoj ricevos valorajn premiojn.**

**Bonvolu sendi viajn kontribuojn ĝis la 30-a de septembro 2018 al adreso: e-mail: [modest@abv.bg](mailto:modest@abv.bg) aŭ per la poŝto al adreso: Georgi Mihalkov, Sofio – 1229, “Vrabnica” 1, bl. 529 vh. A et. 9 ap. 33, Bulgario.**



# La 103-a Universala Kongreso – Lisbono



<https://www.uea.org/kongresoj>

Ĝis la fino de la unua aliĝperiodo (31-a de decembro 2017) al la 103-a Universala Kongreso de Esperanto, okazonta en Lisbono (Portugalio) inter la 28-a de julio kaj 4-a de aŭgusto 2018, aliĝis 1019 homoj el 61 landoj, kio anoncas sufiĉe grandan aranĝon. La Alta Protektanto de la kongreso estas Luís Filipe de Castro Mendes, Ministro pri Kulturo en al registaro de Portugalio.

# La 85-a itala kongreso de Esperanto en San Marino



<http://kongreso.esperanto.it/85/bonvenon.htm>

Itala Esperanto-Federacio informas, ke la 85-a itala kongreso de Esperanto okazos inter la 18-a kaj 25-a de aŭgusto 2018 en San Marino. La kongreso pritraktos la temon **San Marino kaj Esperanto: malgrandaj komunumoj kaj grandaj valoroj**.

La kongresa programo konsistos el plurtagaj seminarioj gvidataj de kompetentaj spertuloj, kiujn kompletigos prelegoj pri diversaj temoj, lingvokursoj, prezento de novaj eldonaĵoj, libroservo, koncertoj, ekskursoj... La unua aliĝperiodo finiĝos la 31-an de januaro. Tiuperiode la kotizoj estas jenaj: **plena** 70,00 eŭroj, **rabatita** (por eksterlandano, familiano de kongresano, junulo kaj handikapulo) 35,00 eŭroj.



## Afrikanano kantanta en Esperanto

Multaj konsentas, ke Afriko estas la plej perspektiva regiono por disvastigo de Esperanto, aparte pro la juneco de sia loĝantaro. Averaĝa afrika esperantisto estas multe pli juna ol esperantistoj en Eŭropo. Konfirmas tion ankaŭ **Joel Muhire**, kiu estas nur 28-jara. Li estas instruisto de Esperanto kaj muzikisto, loĝanta en Rutshuru en Demokratia Respubliko Kongo, proksime al la limo kun Ugando.

Pri Esperanto li ekciis en 2008 de **Honoré Sebuoro**, kaj ekde tiam li estas fervora esperantisto. En 2012 Joel ekokupiĝis pri muzikkomponado. Pro malbonaj sekurecaj kondiĉoj en Rutshuru, li portempe fuĝis al Ugando, kie li komponis la kanton *Al nia lingvo*, uzante la versojn de Julio Baghy. Ĉiujn postajn kantojn li komponis post la reveno al DR Kongo en 2014. Tiujare li organizis propagandcelan discedon tra la *Radio Alliance FM* kaj aktive propagandis Esperanton en la orfa lernejo Njiwa, kio ne estis facila tasko.

En marto 2017 li proprarimede efektivigis sian malnovan revon kaj eldonis dekpecan muzikan albumon *Esperanto, ilo de paco*, per kiu li pruvis al lokuloj, ke Esperanto belsonas kaj uzeblas en ĉiuj kampoj, inkluzive por kantado. Nun liajn kantojn volonte aŭskultas kaj esperantistoj kaj neesperantistoj en la ondoj de la lokaj radiostacioj *Racove FM*, *Rtedh FM* kaj *Racou FM*. Ĉiuj gekantistoj, krom lia eksa kolego **Frato Elie Havugimana**, kiuj akompanas lin en la kantado, estis lernantoj de Esperanto en lia *Rondo Esperantista de Kiwanja* (REK).

La unua serio de la muzika albumo *Esperanto, ilo de paco* elĉerpiĝis, sed Joel volus eldoni novan serion, krome ankaŭ sekvajn albumojn, sed liaj financaj rimedoj estas nesufiĉaj. Bonvolu aŭskulti liajn kantojn ĉe: [www.senopone.wordpress.com/albumo](http://www.senopone.wordpress.com/albumo). Ankaŭ en jutubo aŭskulteblas *Al nia lingvo*. Se vi ŝatas la kantadon de tiu vigla afrika kantgrupo, helpu al Joel Muhire per financa subteno al lia konto **jmhr-a** ĉe UEA kaj kontaktu kun li:

**Joel Muhire**  
Po Box 08 Ug, Bunagana-Kisoro, Ugando.  
Retadrese: joelmuhireo@gmail.com.



<https://www.youtube.com/watch?v=FsICpvqdFhI>

## Prelegserio *Forgesitaj samideanoj*

Al tiuj zagrebaj esperantistoj, kiuj volas ekscii iomete pri la historio de Esperanto en Kroatio, certe estos interesa la prelegserio **Forgesitaj samideanoj**, kiun en la unua duono de 2018 organizos Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE). La prelegojn prezentos **Josip Pleadin** kaj ili okazos ĉiun lastan sabaton inter januaro kaj junio 2018 je la 11h00 en la societejo de UZE en Radnički dol 1.

Jen la listo de planitaj prelegoj:

**La 27-an de januaro 2018:** *FRAN KOLAR KROM (1877-1927), fondinto de Esperanto-societo en Bjelovar kaj tradukinto de la unua romano el la kroata literaturo.*

**La 24-an de februaro:** *ILIJA PUHALO (1899-1937), la ĉefa figuro de la Internacia Asocio de la fervojistaj esperantistoj.*

**La 31-an de marto:** *IVAN MATAŠIN aŭ JOHN MATASIN (1899-1980), kroata elmigrinto en Sidnejo.*

**La 28-an de aprilo:** *MARINKO GJIVOJE (1919-1982), historiisto de Esperanto en Jugoslavio.*

**La 26-an de majo:** *BUDE BORJAN (1904-1941), la unua viktimo de la ustaŝa teroro.*

**La 30-an de junio:** *VILIM BUK (1891-1962), presisto kaj eldonisto de La Suda Stelo.*

Se la esperantistoj montros intereson pri la proponitaj temoj, en la dua duono de la jaro okazos alia serio de prihistoriaj prelegoj. Bonvenon!

## Davor Grgat (1935-2018)

Post mallonga malsano forlasis niajn vicojn ankoraŭ unu el la veteranoj de Esperanto en Kroatio – **Davor Grgat**, homo kun nobla karaktero kaj serena animo, kiu por Esperanto agadis verkante artikolojn, ĉar antaŭ ĉio li estis ĵurnalisto.

Davor naskiĝis la 10-an de oktobro 1935 en Krilo-Jesenice apud Omiš en Dalmatio. Origine li estis murpentristo kaj meblokolorigisto, sed multe pli konata kiel amatora ĵurnalisto. Post finita okklasa lernejo kaj gimnazio en Omiš li finis metilernejon en Split (1951-1954). Ekde 1958 li laboris en Sarajevo (Bosnio kaj Hercegovino) kaj Titograd (nuntempe Podgorica, Montenegro), kaj ekde 1960 en *Dekor* (Split), kiu kunfandiĝis kun la entrepreno *Obnova*, kaj sub tiu nomo daŭrigis funkcii kiel kolorigista entrepreno. Tie li laboris ekde 1964 ĝis sia emeritiĝo en 1993. Li esperantistiĝis kiel 19-jarulo aŭtodidakte en Split en la jaro 1954 kaj tuj ekpropagandis Esperanton en Hvar sur la samnoma insulo. Dum la soldatservo en la jugoslavia mararmeo (1955-1958) li propagandis Esperanton inter la maristoj, soldatoj kaj civitanoj, kaj gvidis Esperanto-kursojn en Pula kaj Ploče. En la jaro 1956 kiel SAT-ano li partoprenis la 26-an SAT-kongreson en Beogrado, estante la unua soldato-esperantisto en uniformo. Poste li organizis plurajn prelegojn, ekspoziciojn kaj kursojn por soldatoj, oficiroj kaj civitanoj en la urba Lernejo por metilernantoj en Ploče kaj por geinstruistoj en la Gimnazio de Metković. La rezulto de tiu lia laboro estis fondo de la unua Esperanto-grupo en la jugoslavia armeo sub la nomo *La maristo* en la kazerno de Ploče (1956), kies kunfondinto li estis. Li gvidis kurson en la karbid-fabrika *Dalmacija* en Dugi Rat, en la gimnazio de Omiš kaj estis aktiva en la sarajeva Esperanto-societo *Vasa Pelagić* dum sia restado en tiu urbo. Li sukcese faris B-ekzamenon kaj fariĝis sekretario

de la respublika esperantista junulara komitato por Bosnio kaj Hercegovino en Sarajevo. Ekde 1960 li aktivis en la Esperanto-societo *Split*, Esperanto-klubo *Frateco kaj unueco* kaj Esperanto-klubo *Ivo Lola Ribar* en Split. En la jaro 1979 dum la 8-aj Mediteraneaj sportludoj en Split, dum kiuj li funkciis kiel oficiala ĵurnalisto-esperantisto, li kunhelpis enkonduki Esperanton kiel trian oficialan lingvon inter la sportistoj de la Ludoj (apud la kroata kaj angla). La samo, dank' al Grgat, okazis dum la 25-a internacia tablotenisa ĉampioneco en septembro de 1982 kaj dum la 15-a Eŭropa ĉampioneco pri atletiko en aŭgusto 1990. Dum somero 1980 li gvidis kaj redaktis dulingvan 20-minutan elsendon en Radio stacio Split. Al ĵurnalismo li dediĉis sin jam en la jaroj 1956/57 kaj skribis pri diversaj temoj, raportante por multaj gazetoj kaj radio-stacioj enlande. Aparte oni devas elstarigi lian preskaŭ 60-jaran artikoladon en *Slobodna Dalmacija* (ekde 1957) en Split, kie aperis multegaj liaj artikoloj, kiuj preskaŭ kronologie notis ĉiun gravan eventon en la enlanda kaj monda Esperantomovadoj. En 1979 li frekventis kaj finis ĵurnalistan lernejon kaj ekde tiam li estas oficiala membro de Kroata ĵurnalista societo (Hrvatsko novinarsko društvo). Dum la 70-a UK en Aŭgsburgo li fariĝis estrarano de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio (TEĴA) kaj kunlaboranto de *Internacia ĵurnalisto*. Li publikigis artikolojn ankaŭ en *La Suda Stelo* (kroniko), *Jugoslavia Esperantisto*, *La Progreso*, *Jugoslavia Stelo*, *Tempo*, *Zagreba Esperantisto*, *Monato* kaj aliaj. Dum pluraj Universalaj Kongresoj de Esperanto li helpadis redakti kongresajn kurierojn. Li estis la unua prezidanto de Esperanto-klubo *Frateco kaj unueco* en Split (1974), dum pluraj mandatoj prezidanto de Esperanto-societo *Split*, kaj la lasta prezidanto de Esperanto-ligo de la komunumo Split. En la ampleksa nacilingva ĵurnalista leksikono, aperinta en 2002, inter multaj konataj ĵurnalistoj, troviĝas ankaŭ la nomo de Davor Grgat kiel sola kroata ĵurnalisto uzanta Esperanton. Por



sia ĵurnalista kunlaboro ekde la komenco de aperado de *Zagreba Esperantisto*, Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE), atribuis al li la ĵurnalistan premion *Degenio Velebita* en 2014.

Davor partoprenis la historian 1-an kongreson de esperantistoj-ĵurnalistoj en Vilnius (Litovio) en 2008, kaj en 2016 aperis libroforme kolekto de liaj plej interesaj kroatlingvaj artikoloj, kiuj enhavas ankaŭ multon pri Esperanto.

En 2014 li perdis sian vivkunulinon Antica (karese nomitan Tonka), kiu akompanis lin dum liaj multaj vojaĝoj kaj Esperanto-kongresoj kaj aranĝoj. De tiu dolora kaj tragika perdo li sukcesis bone resaniĝi. Ekde 1964 li fariĝis abstinulo kaj kunfondis societon de alkohol-abstinuloj. Dum multaj jaroj li batalis kontraŭ diabeto. Ĉirkaŭ Kristnasko de 2017 li estis trafita de infarkto kaj pasigis en la hospitalo de Split plurajn tagojn ĝis la tragika 9-a de januaro 2018, kiam lia koro ĉesis bati. Multaj liaj kolegoj esperantistoj estis konsternitaj aŭdinte pri lia morto, ĉar ankoraŭ en aŭgusto pasintjare li estis bonfarta kaj ĝue partoprenis la esperantistan kulturfestivalon INTER-FEST en Bjelovar.

Multaj liaj familianoj, parencoj, amikoj kaj kunlaborantoj adiaŭs lin la 11-an de januaro 2018 en la loka tombejo Sustipan en Jesenice, lia naskiĝvilaĝo.

*Josip Pleadin*





## Karlo (Drago) Blažeka (1941-2017)

Bjelovar. Unue li laboris en la metiejo de Franta Svěrak en Bjelovar, kie li praktike lernis la seruristan metion, kaj poste li mallonge laboris en kelkaj firmaoj. Li kapabliĝis kiel prizorganto de medicinaj aparatoj kaj laboris en la Medicina centro de Bjelovar ĝis la emeritiĝo en 2000. Li estis membro de *Češka obec* (Ĉeĥa komunumo) en Bjelovar, kie dum la rikolta festo de ĉeĥoj en 1967 li konatiĝis kun sia estonta edzino Vlatka el Hercegovac, al kiu li edziĝis en 1968. Unu jaron poste (1969) naskiĝis al ili filino Romana.

Esperanton li eklernis en 1956 kune kun ĉiuj samklasanoj de metiista faklernejo en Bjelovar, post kio li ekaktivis en la loka Esperanto-societo. En 1958 li estis membro de la unua Esperanta junulara laborbrigado apud Cerknjiško jezero en Slovenio. En

1959 li sukcese faris ekzamenon pri la elementa lingvoscio de Esperanto antaŭ la komisiono de Kroata Esperanto-Ligo (KEL), kiun prezidis profesoro Fran Novljan. Tiu esperantista generacio poste disiris, sed kiam bjelovaranoj planis organizi la 9-an kongreson de kroataj esperantistoj, li tuj reaktiviĝis, renovigis la scion de Esperanto en la kurso gvidita de Josip Pleadin, partoprenis la kongreson kaj plenumis kongresajn laborojn. En 2011 esti (re)fondita Bjelovara Esperantista Societo, kaj li troviĝis inter la refondintoj kaj regulaj membroj.

Dum la entombigo la 8-an de decembro 2017 en Bjelovar, la lokaj esperantistoj adiaŭis de li per verde-blanka girlando kaj la adiaŭa parolado de Nenad Margetić.

Zdenka Polašek

La 6-an de decembro 2017 en Bjelovar forpasis **Karlo (Drago) Blažeka**, membro de Bjelovara Esperantista Societo. Li naskiĝis la 20-an de oktobro 1941 en Čehovec (komunumo Prelog) en la familio de patro Ivan kaj patrino Marija. Elementan lernejon li finis en Prelog kaj metiistan faklernejon (*Škola učenika u privredi*) en

## KONCIZAJ INFORMETOJ



Iomete malfrue nia redakcio ricevis la foton, kiu prezentas la oficialan transdonon de la diplomo pri *Jara premio de Kroata Esperanto-Ligo* al Bjelovara Esperantista Societo. La premion proklamis kaj la diplomon transdonis prezidanto de Kroata Esperanto-Ligo **Anto Mlinar** (maldekstre) al prezidanto de Bjelovara Esperantista Societo **Franjo Forjan** (dekstre) la 16-an de decembro 2017 dum la jarkunveno de KEL, okazinta en Zagrebo.

\*\*\*

*Pučki kalendar Bjelovarsko-bilogorske županije* (Popola kalendaro de la Departemento Bjelovar-Bilogora) por 2018, en la paĝo 156 publikigis longan artikolon *Uspješan festival esperantske kulture u Bjelovaru* (Sukcesa festivalo de la Esperanta kulturo en Bjelovar) kaj tri kolorajn ilustraĵojn (paĝoj 71, 75 kaj 85) pri la sama temo. Krome, en la artikolo *Šetnja kroz povijest BBŽ*, oni mencias sub 2015 la tradukon de *La trajno en la neĝo* en Esperanto (paĝo 12). La viziton de esperantistoj mencias ankaŭ Drago Troščan en la jara raporto pri Komunumo Veliki Grđevac (paĝo 120).

\*\*\*

Esperanto-periodaĵoj publikigis recenzojn pri kelkaj Esperantaj libroj eldonitaj en Kroatio: **Literatura foiro** (n-ro 290, paĝoj 336-339): *Provoka, plurtavola romano* (de Zdravko Seleš) pri *La nigra patrino tero* de Kristian Novak; **Literatura foiro** (n-ro 290, paĝoj 333-334): *Instrua, edifa, aktuala* (de Carlo Minnaja) pri *Elektitaj tekstoj pri Internacia Juro* de Ivo Lapenna; **Esperanto-revuo** (n-ro 1318, paĝoj 231-233): *Ivo Lapenna – esperantisto kaj juristo* (de Sven Ziegler) pri *Elektitaj tekstoj pri Internacia Juro* de Ivo Lapenna; **Esperanto-revuo** (n-ro 1320, paĝo 8): *Plia verda kabaredo* (de Valentin Melnikov) pri *Verda rido* de Nikolao Ĥoĥlov.

## Viaj opinioj

Post la dissendo de la unua numero de KRESKO, ni ricevis pli ol cent respondojn kaj komentojn, el kiuj ni ĉerpis la plej interesajn opiniojn, kiujn ni prezentas al vi. Ni klopodos konsideri viajn opiniojn en la estonta redaktado de nia gazeto kaj invitas vin ankaŭ estonte skribi al ni.

**Vinko Ošlak (Aŭstrio):** Mi kore dankas vian unuan numeron de KRESKO kaj ĝojas ĝian starton sub novaj kondiĉoj. Kompreneble mi kun ĝojo deziras ankaŭ estonte ricevi viajn numerojn. Estis tempo, kiam Kroatio estis vera grandpotenco en Esperantujo – ne troviĝas principa kialo, ke tio ne okazu denove. Tiel bone redaktita reta revuo povas esti bona komenco.

**Vasil Kadifeli (Turkio):** Dankon pro tiu bela gazeto, ĝi aspektas tre profesia. Estas multaj aspektaĵoj, kiujn mi povas imiti en nia revueto *Turka Stelo*.

**Stefan MacGill (Hungario):** Mi volonte plue ricevos ĝin, eble mi tiros erojn el ĝi por internacia distribuo pere de EKO-komuniko. Same Hungario delonge rezignis pri presitaj revuoj kaj uzas elektronikajn komunikilojn. Sed bone, ke ĉe vi ĝi tenas la formon de revuo.

**Eugène de Zilah (Francio):** Ni danke ricevis la unuan numeron de via retrevuo *Kresko*. Ni notis la permeson: *KRESKO estas libere distribuebla, kopiebla kaj citebla en ĉiu ajn formo*. Ni eluzos tiun ĉi permeson tiom kiom eblos. Kompreneble kun citado de la fonto.

**Yenovk Lazian (Germanio):** Dankon pro la sendo de *Kresko*. Mi deziras longan kaj sukcesan vivon al via iniciato. Mi trarigardis la ekan numeron. Kion mi diru? Por ke tia eldonaĵo estu atentonveka, oni prefere evitu ted(ig)ajn movadajn informojn kaj ne aperigu fotojn kun vice sidantaj gehomoj, des malpli dedorsflanke. Oni fajfas pri la pasintaj renkontiĝoj. Oni ne bezonas vidi la nukojn de la samideanoj, nek la jam kvinmilan foton de d-ro Zamenhof. Via lando havas riĉegan pasintecon: rakontu do pri ĝi, traduku el via nacia literaturo, vizitigu al la leganto la vidindaĵojn. Jes ja, tio postulas iom pli da laboro ol “movadaj raportoĵ”, sed alportos freŝan aeron.

**Velimri Piškorec (Zagrebo):** Belega reta revuo kaj grava paŝo antaŭen! Gratulon!

**Olga Srkoč (Zagrebo):** Mi estas impresita de viaj aktivecoj kaj engaĝiteco. Mi ĝojas, ke vi havas la vizon kaj iras antaŭen. Feliĉon ankaŭ en la estonteco.

**Stano Marček (Slovakio):** Koran dankon pro via KRESKO n-ro 1, kiun mi kun intereso tralegis. Gratulon pro via bela iniciato kaj vere leginda reta periodaĵo!

**Yu Jianchao (Ĉinio):** Gratulon al vi pro via reta gazeto KRESKO, kiu donas surprizĝojn. Mi legis la novan gazeton, kaj informiĝis multe pri via agado. Interesas min via nova programo Inter-fest kaj la nova projekto pri briko-kuponoj por konstrui la domon de Dokumenta Esperanto-Centro. Mi kompreneble aĉetos miajn brikojn, ĉar la centro donis al mi multon.

**Renée Triolle (Francio):** Dankojn por la sendo de via informilo KRESKO. Estas ĉiam interese legi pri alies aranĝoj, ideoj kaj sukcesoj. Mi sekve volonte ricevos la postajn numerojn kaj deziras al la bulteno KRESKO bonan kreskon kaj sukceson.

**Adam Wilkus (Pollando):** Verdire mi antaŭe neniam aŭdis pri *Kresko*, sed nur konis *Zagreban Esperantiston*. La enhavo estas interesa. Tamen, krom informoj pri aranĝoj, mia opinie estus bone plu mencii la aferojn, kiuj rilatas al Kroatio, sed povas esti interesaj por eksterlandanoj, ekzemple tiuj, kiuj planas viziti vian landon.

**Johan Derks (Serbio):** Mi bedaŭras por la kroataj esperantistoj, ke ne plu ekzistos informilo sur papero, krom se ili abonas iun internacian informilon aŭ revuon. Mi esperas, ke iam venos la tempo ke aperu – denove papere – *balkana* revuo, kiu devigos nin esperantistojn kunlabori kaj rigardi trans la landlimojn.

**Georgi Mihalkov (Bulgario):** Hodiaŭ mi ricevis *Kreskon*, decembran numeron, 2017. Koran dankon. Mi detale tralegis ĝin kaj mi gratulas vin. *Kresko* respegulas la riĉan Esperantan agadon de zagrebaj geesperantistoj kaj ĝi estas tre utila Esperanto-informilo, ĉar informante pri la kroata Esperanto-agado ĝi stimulas la Esperanto- agadon en najbaraj landoj kiel Bulgario.

**Boris Di Costanzo (Opatija):** Mi havas unu demandon: kial ne la ĝisnuna *Zagreba Esperantisto*?

### KRESKO monata informilo

#### Eldonas:

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE),  
Jarunska 6, 10000 Zagreb

#### Retadreso de la redakcio:

zagreba.esperantisto@gmail.com

#### Redaktas: Josip Pleadin

*Kresko* aperas en la lasta tagdeko de ĉiu monato.

***Kresko estas libere distribuebla,  
kopiebla kaj citebla.***